



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 30 > • AMO 86 • Universitatoj • Kuriero < majo 30



AMO 86 transformita – kio restas, kio ŝanĝiĝas?

Ni delonge dissendis informojn pri AMO 86, planita por Aŭstralio kun la temo 'Esperanto por peri Oceaniajn Kulturojn' en la 12a de junio. Do, kio restas, kio ne?

Restas: La dato, la temo, la enhavo.

Ŝanĝiĝas: Ne plu aŭstralia, sed internacia. Ne plu hibrida, sed plene virtuala.

La kialoj: Niaj aŭstraliaj kolegoj bedaŭrinde devis lastmomente rezigni pri AMO nun, ĉar ili devis nuligi la planitan Vintran Lernejon. Norduloj, forgesu pri viaj vintraj antaŭjuĝoj, aŭstralia vintro povas esti ege milda kaj agrabla! Sed, ne sukcesis la klopodo, tial la ĉeesta publiko por AMO subite malaperis. Sed el Aŭstralio venas promeso pri AMO-seminario en la sekva Somera Lernejo en januaro 2023.

La ĉiam pripensata 'Plano B': Ene de du tagoj, tuta nova solvo pretis. La seminario okazos virtuale, dank' al niaj dependeblaj AMO-aliancoj en Irano, kiuj jam fidele servis nin ekde la Kovid-eko en marto 2020. Do, la seminario okazos rete, ekde 10:00 ĝis 12:00 UTC (12:00-14:00 CEST – Centreŭropa Somera Tempo).

La ligilo per Zoom.

<https://us02web.zoom.us/j/83077839393>

Nur se demandite:

Kunven-identigilo (Meeting ID): 830 7783 9393

Pasvorto (Passcode): la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj.

La enhavo: Tute pretas du bon-kvalitaj prezentoj, unu pri bone konata maoria legendo el Nov-Zelando, dua pri la indiĝenaj kulturoj el Aŭstralio. Tria prezento, el la pacifika insulo Tahiti estas jam tradukita kaj nun teknike pretigata. Do, por ekscii pri ĉi tiaj foraj kulturoj, aliĝu al nia virtuala AMO-seminario! Legu la alkroĉaĵon pri la serio de UEA por la serio 'Oriento-Okcidento', kiu formas bonan preparon por AMO 86 kaj AMO 90.

Plia pripensado por universitata akcelado

La "Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj" de ESF/UEA/ILEI/TEJO kun IrEA (nia irana landa asocio) okazigas la sekvan, sub la titolo:

Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj (La 29-a sesio)

Ni bonvenigas partoprenadon de ĉiuj interesatoj! Lunde, la 6-an de junio 2022, je 13:30 laŭ UTC, kun gvidado de prof. Renato Corsetti. Venu por diskuti kaj vidi kion ni povas plenumi por pli efike vigligi Esperanton en la Universitatoj tra la tuta mondo! La kompletaj registraĵoj de la antaŭaj sesioj spekteblas en la jutuba kanalo de UEA: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>

kaj la retejo de IrEA: <https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

Jen la ligilo al la virtualejo en Zoom: <https://us02web.zoom.us/j/84502260578>

Nur se demandite: Kunven-Identigilo (Meeting ID): 845 0226 0578

Pasvorto (Password): la nomo de nia karega lingvo per minusklaj literoj

Azio agas bultene

Danke al viaj kunlaboroj aperis “Esperanto en Azio kaj Oceanio 113 (2022 aprilo)”

<https://drive.google.com/file/d/1Afbu0tn-dTxwJrx8Xs7VbpOdRlyX74Lg/view?usp=sharing>

Por la venonta numero de nia bulteno, mi kore petas vin kontribui per viaj raportoj pri agadoj en via lando, urbo, asocio, societo aŭ klubo kaj informoj aŭ ideoj utilaj por agado aŭ lernado de Esperanto!

Nisinaga Atusi (Acero / NIŜINAGA Acuŝi),
Prezidanto de Azia-Oceania Komisiono de UEA; acero@an.email.ne.jp

Kanta trofeo elstarigas Afrikon

La kanto "Milito aĉas" de Joel Muhire okupas la unuan rangon dum la 20-a Kantoparado de la Ratkaptista Bando Hameln (Germanio). El la 43 partoprenantoj el 19 landoj (Togolando, Usono, Hispanio, Svedio, Belgio, Svislando, Francio, Kongo Kinŝaso, Rusio, Italio, Bulgario, Pollando, Ĉeĥio, Ukrainio, Litovio, Britio, Kroatio, Aŭstrio kaj Germanio), voĉdonis 36 personoj. La finaj rezultoj montriĝas jen:



4) Adjévi+Axel: 3:22 Milito aĉas – Joel Muhire	42
1) Jean: 4:53 Haleluja – Manŭel	38
9) Pavel: 4:29 Milito – Jomart kaj Nataŝa	33
6) Karl-Heinz: 4:37 2063 – i.d.c.	29
3) Heinz: 6:47 Ĉu vi pentas? – Persone	28
2) Julio: 5:00 Tiel la mondo iras – Amindaj	23
5) Asta: 4:28 Rideto de l' somero – Asorti	21
7) Julia: 2:02 Ni vin ŝkuos – Gonzalo Moreira kaj aliaj	19
8) Flávio: 3:45 Eô se – Flávio Fonseca	7

Vi trovas la rezultojn, statistikojn de la voĉdonado kaj ankaŭ ligilojn al la proponitaj kantoj por la 20-a Kantoparado ĉe

https://eventaservo.org/e/RB-11maj22-20a_Kantoparado

Adjévi Adjé

Serbo kaj Jomo en Hispanio

Saša Pilipović kantas "Du gitaroj" en la 80-a Hispana Kongreso de Esperanto:
<https://youtu.be/Q9dyFOpVkmQ>

Jomo regalias la publikon per sia versio de "La bambo", en la 80-a Hispana Esperanto-Kongreso:
<https://youtu.be/GeVJYdDT-Bo>

mga

Bela kunveno en Lomeo

Sabate, la 7-an de majo 2022 okazis renkontiĝo de esperantistoj en Lomeo (Togolando) en ĝardeno apud la laguno de Be. Speciala gastino dum tiu kunveno estis la francino Angélique Denis. Entute la etoso dum pli ol 4 horoj estis mojosa: sinprezento de partoprenantoj, iniciato al meditado, interbabiladoj, interŝanĝoj de spertoj pri instruado al komencantoj, kunmanĝeto kaj trinkaĵoj, spektado de la freŝdata muzikaĵo "Milito ačas" de Joe Mo (Joel Muhire) kaj kunlernado de la teksto de la kanto. Detalaj raportoj aperos en la afrika bulteno.



Adevi

AMO 87 en Litovio

Bonvolu legi ĉi tie: <https://sezonoj.ru/2022/05/bet-125/>

La kuriero – nova numero elŝutebla



Intertempe aperis nova numero 2022/1 de la Unesko-Kuriero, kun tre interesa kaj aktuala temo: 'Ĉu ni timu Neŭrosciencan'? Jen la adreso:

https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000380264_epo

Por elŝuti, iru al 'full text' kaj klaku en la ikono kun sago malsupren, kaj elektu 'konfirmi la plenan dosieron en pdf'.

Tonjo del Barrio

La retejo de UEA ebligas la elŝutigon, sed la elŝuto mem okazas ĉe la retejo de Unesko, por ke ili kalkulu la elŝutojn kaj vidu la valoron de la Eo-versio.

La Irana Kongreso

Ni elkore dankas al ĉiuj 31 samideanoj, kiuj prelegis dum la lastaj 4 tagoj en nia evento. Jen la registraĵoj de la 9-a Irana Esp-Kongreso en la jutuba kanalo de UEA, kiuj entute spektiĝis 928 fojojn ĝis nun:

Ligiloj al la kvar tagoj:

<https://youtu.be/aAAbryez3CM>

<https://youtu.be/okbznkrcicw>

<https://youtu.be/jfLox320tUQ>

<https://youtu.be/IR2RnVN8V74>

Jen la detala listo de ĉiuj 31 prelegoj: <https://www.espero.ir/eo/irek-9/>

Ahmad Mamduhi

Astronomia bulteno rete alirebla

La Eo-klubo en Pistoia korespondis antaŭ kelkaj jaroj pri ISAE kaj sciencoj ĝenerale.

Jen iniciato pri astronomio. Mi estas prizorganta duonmonatan astronomian bultenon ĉe [esperradio](#). Ĝi aperas dum la unua kaj la dekkvina tagoj ĉiumonate.

Info<ĉe>esperanto-grupo.it>

Pistoja Esperanto-Grupo, "Umberto Stoppoloni" APS, Via dei Ciuti, 49/e

51100 Capostrada – PT, Cell. +39 347 78.92.672, Skype 'nikmorand', <http://www.esperanto-grupo.it>



Konatiĝu kun oceaniaj kulturoj

Proksimiĝas AMO 86, okazonta en la 12-a de junio. La temo estos 'Esperanto por peri Oceaniajn Kulturojn'. Jen grava mondparto, kiun la kultura mondo de Esperantio neglektas tra la jardekoj. AMO kontribuas por ŝanĝi tion. En la programo vi spertos tri legendojn de indiĝenaj popoloj el Nov-Zelando, Aŭstralio kaj la insulo *Tahiti*.

La temo revenos en AMO 90, okazonta dum la UK kun la titolo 'Kulturaj Trezoroj ekster Eŭropo.'

Ekzamenaj ebloj baldaŭ!

La redaktoro de [edukado.net](#) informas:

Jen teksta kaj filma raporto pri la plej freŝaj novaĵoj pri la KER-ekzamenoj. En la sekva monato eblos trapasi KER-ekzamenojn en niveloj C1, B2 kaj B1 rete, el vi hejmo. Baldaŭ finiĝos la aliĝperiodo. Ne mistrafu la premieron, ĉar rete eblos ekzameniĝi nur unufoje jare, kaj tiu okazo estos nun, en junio!

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=872>

===== vortoj: 1020 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.